La vivo de Ŝimazaki Toŝikazu kaj lia korespondado

"Renkontiĝo" kun Ŝimazaki Toŝikazu

Iun tagon antaŭ kelkaj jaroj, viro de mia aĝo, Ŝimazaki Taekazu, vizitis nian domon. Li vidis lokan gazeton Ĵoomoo, en kiu mi aperis rilate al Esperanto. Li diris al mi, ke lia patro estis esperantisto, kaj li montris al mi albumon de ilustritaj poŝtkartoj el la tuta mondo, kiujn lia patro kolektis. « Ŝimazaki Toŝikazu? » Tio estas nomo, kiun mi aŭdis antaŭe. En la libro « Esperanto-Movado de Gunma 1906-2010 » mi trovis jenajn menciojn pri li :

1929 : Ŝimazaki Toŝikazu, unu el la membroj de Japana Esperanto-Instituto en Gunma. Loĝis en Hjakken-maĉi, Maebaŝi

1937: Li partoprenis en la 25a Japana Esperanto-Kongreso (Tokio)

1939: Li akiris diplomon de alta nivelo de Esperanto.

1940: Li partoprenis en la 28a Japana Esperanto-Kongreso (Mijazaki)



Ŝimazaki Toŝikazu (Foto : 21-jara Toŝikazu) naskiĝis en la 2-a jaro de Taiŝoo (1913), la sama aĝo kiel mia patro. Tamen, Ŝimazaki Toŝikazu estis mobilizita al la fronto en Ĉinio, kie li malsaniĝis, kaj kvankam li revenis al Japanio en 1946, li mortis pro malsano. Ankaŭ mia patro estis mobilizita al la fronto en Ĉinio, sed li postvivis la militon kaj vivis ĝis la aĝo de 91 jaroj kiel postmilita esperantisto. Taekazu, la filo de Toŝikazu, kaj mi estas samaĝaj, do mi estis profunde kortuŝita de tiu ĉi koincido. Iom ekstertema, Niimi Nankiĉi, mia ŝatata verkisto de infanrakontoj, naskiĝis en la sama jaro kiel Toŝikazu kaj mia patro. Li mortis dum la milito, lamentante, ke li ne povas kontribui al la patrujo kiel soldato pro sia malforta korpo. La sortoj de tiuj tri viroj naskitaj en la sama jaro estis tiel malsamaj, kaj dum mi kreskis sub la protekto de mia patro, Taekazu kreskis sen koni la vizaĝon de sia patro. Pro tiuj faktoj mi havis senton de respondeco.

Lia vivo en la komerca lernejo

Ŝimazaki Toŝikazu estis la filo de komercista familio de kruda silko en la urbo Fuĵioka, gubernio Gunma. Ĉar de Fuĵioka li ne povis frekventi lernejon en la gubernia ĉefurbo Maebaŝi, li loĝis en Hjakken-maĉi, Maebaŝi (nuntempe Asahi-ĉoo). En "Esperanto-Movado de Gunma 1906-2010", en la paĝo por 1929 estis skribite, "Okazis enkonduka klaso. 13 partoprenantoj, el kiuj la plimulto estas lernantoj de Maebaŝi Komerca Lernejo" (la 12-an de januaro). Estas foto de "Festa Ekspozicio okaze de la translokiĝo de Maebaŝi Komerca Lernejo". En la centro de la foto estas kvadrata kolonsimila objekto nomata "Turo de Espero", kaj sub ĝi sidis tri plenkreskuloj kaj ok lernantoj. Sur la turo estas montritaj leteroj kaj poŝtkartoj el eksterlando. Bedaŭrinde Toŝikazu ne estas en la bildo, sed lia filo, Taekazu, diras, ke tiu ĉi foto estis farita de lia patro, kiu sidus en la malplena sidloko en la maldekstra angulo.

Kiel Toŝikazu renkontis Esperanton? Oni povas scii tion el lia taglibro la 27-an de novembro 1931.

"Mi ankoraŭ povas memori ĉi tiun monaton en Maebaŝi. Estis novembro, kiam mi unuan fojon eksciis pri la seminario de Esperanto okazonta en la urba biblioteko. Mi kare rememoras la stratojn, laŭ kiuj mi vizitadis la seminarion en malvarmaj ventoj de Maebaŝi."

Laŭ tiu ĉi priskribo, Toŝikazu ĉeestis la « bazan klason dum du horoj ĉiusabate ekde la 19:00 » post la fondo de « Gunma Esperanto-Studgrupo » la 11-an de novembro 1928, kune kun siaj samklasanoj de Maebaŝi Komerca Lernejo. Kaj, kiel la plej entuziasma membro de la kluba agado, li certe okupiĝis ankaŭ pri internacia korespondado. La sekvanta estis skribita en la taglibro datita la 14-an de aŭgusto 1934.

« Neniu krom ni popularigis la lingvon Sanskriton kaj Esperanton en la lernejo. Ĉi tio estas ne fanfarona. Ĝi estas nur simpla fakto. »

Ĉi tiuj agadoj verŝajne kondukis al lia enorma "internacia korespondado", kiun li ne forlasis ĝis sia morto.

Poŝtkartoj el la tuta mondo

La filo Taekazu montris al mi la albumon. Ĝi estis aranĝita de Toŝikazu, kaj estis du volumoj. Kiam mi malfermis ĝin, la unua afero, kiu kaptis mian atenton, estis poŝtkarto kun foto de Mussolini. Estis ankaŭ bildkartoj de la Unu-Kolona Pagodo en Hanojo, Vjetnamio, kaj poŝtkarto de la kastelo en Hue, Vjetnamio, kiujn mi iam vizitis. Unuavide mi komprenis, ke tio estas valora materialo, kaj tuj proponis, ke ni faru libron pri

la kartoj. Mi skanis ilin kaj komencis deĉifri ilin. Mirinde estis tiom da bildkartoj el kvin kontinentoj tra la mondo.

Mi planis publikigi tiujn bildkartojn en la japana kaj Esperanta tradukoj, sed mi pensis, ke la legantoj ne povos bone kompreni sen klarigoj, pri kio temas la bildkartoj. Tial mi ekesploris la bildojn sur la kartoj. Mi scias, ke Mussolini estis fondinto de Itala Faŝismo, sed mi konfesas, ke mi ne sciis pli. Hodiaŭ, dank' al Interreto, ni povas rapide serĉi tiajn aferojn. Se mi ankoraŭ ne povas eltrovi necesan informon, mi povas demandi esperantistajn amikojn, kaj ili tuj donas al mi la informojn. Inter la poŝtkartoj estis multaj surprizaj informoj, kaj mi estis ĉiutage ravita deĉifri la poŝtkartojn.

La 1930-aj jaroj viditaj el leteroj

En la bildkartoj lasitaj de s-ro Ŝimazaki Toŝikazu estis ofte skribitaj kiel "Mi sendis leteron", do mi demandis Taekazu-on, "Ĉu ne restas al vi leteroj?", kaj li respondis jese kaj alportis ĉirkaŭ 100 leterojn. Malsame kiel la poŝtkartoj, ĉi tiuj leteroj estis tute fermitaj dum 90 jaroj, kaj kiam mi eltiris la leterpaperojn el la koverto, eliris ankaŭ la sigelita aero de la 1930-aj jaroj. Mi rektigis la faldojn, zorge skanis ilin kaj konservis ilin en mia komputilo.

Post la tralego de la bildkartoj, venis finfine tempo por deĉifri la leterojn. Tiam, la 1930-aj jaroj, kiuj tute ne videblis el bildpoŝtkartoj, tuj ekaperis. Kiaj jaroj estis la 1930-aj jaroj ?

La Granda Depresio ekokazis en 1929, kaj multaj esperantistoj estis senlaboruloj en tiu tutmonda depresio. La starigo de Sovetunio en 1917 kaj la ekesto de la laborista movado kaj komunista movado inspiritaj de ĝi, kaj la leviĝo de la nazioj en Eŭropo, la malpermeso de Esperanto kaj la

kreskanta danĝero de milito. En Sovetunio oni konstruis socialismon, sed en 1937 sub la Stalina reĝimo Esperanto fariĝis « danĝera lingvo » kaj multaj esperantistoj estis persekutitaj. En Ĉinio, Japanio kaŭzis la Manĉuran Okazaĵon en 1931, establis marionetan regnon Manĉukuon, kaj poste komencis plenskalan agresmiliton kontraŭ Ĉinio.

En Japanio la Leĝo por Publika Ordo furiozis, kaj maldekstremaj movadoj estis subpremitaj. Estis tre malfacila tempo. Ŝimazaki Toŝikazu vivis en tiu epoko, kaj ankaŭ liaj korespondantoj. Kiam mi turnis la paĝojn de la leteroj, tia mondo aperis antaŭ mi, kaj mia koro tremis.

Ekde ĉirkaŭ 1937 la nombro da leteroj lasitaj de Ŝimazaki iom post iom malpliiĝis. La monda situacio ne plu permesis korespondadon en Esperanto. Post Germanio, Esperanto estis persekutita en Sovetunio. Ankaŭ en Japanio la liberala penso estis subpremita dum la milittempa reĝimo, kaj ankaŭ esperantistoj estis en tiu kirlakvo. Ŝimazaki havis ankaŭ la timon esti sendita al batalkampo kaj morti.

Unu el la kortuŝitaj korespondaĵoj de Ŝimazaki

Ŝimazaki havis multajn germanajn amikojn. Unu el ili estis Heini Knorr, kiu loĝis en la urbo Königsberg en Germanio (nun Kaliningrad en Rusio). Ŝimazaki kaj Heini estis plej intimaj kaj skribis pri diversaj aferoj. Unu el ili estis fajro en la germana parlamentejo en Berlino. En letero de Heini estis skribite jene:

« Hieraŭ brulis en Berlino la parlamento. Komunista nederlanda bruligis parlamenton, tiel informas la burĝa gazetaro la legantaron. Ĉu vi kredas tion, ke kom-isto estis farinto? Mi ne povas sciigi al vi ĉion, ĉar mi havas suspekton pro malfermo de la tiu ĉi letero.

Estu kuraĝa, ne perdi la kredon al komunismo, ne forgesu vian germanan kamaradon kaj viaj eksterlandaj klasfratoj. Malhelpigu militon kontraŭ Sovetio kaj Ĉinio. Malhelpu la mondmiliton. Agitu kontraŭ ĝin. Nun mi finigas leteron. Skribu tuj. Estu singarde. (Marde arestitaj 80 kom-istajn depuatoj de la parlamento)

Saluton H. K. »


P. S.
Vian ĉi leteron (la poŝtejo) ~~oni~~ resendis al mi, ĉar la afranko estis kalkulita tro malalte. Dum tiu tempo okazis en germanio tre multe. Se vi ricevos tiun ĉi leteron, tiam vi jam scias, kio ~~estas~~ okazis en Germanio. La faŝ. registraro publikigas dekreton kontraŭ marksisma movado. Ĉiuj popolaj kaj sindikataj domoj trasercĉita (per armiloj). Multaj kom. partiaj domoj estas fermataj. Ĉiuj ~~estoj gvidantoj~~ (kaj gvidantoj), kiuj mortigas la aliajn. Ĉiuj socialdemo. k. kom. gazetoj ne devas aperi dum du = kaj ĥvar semajnoj. La poŝtsekreto oni nuligas, tio signifas ke ĉiujn leterojn oni povas malfermi. (kontrolas) Ĉiuj telefonparoloj sûskulti k. t. pl. Hieraŭ brulis en Berlino la parlamento. Komunisto nederlanda bruligis parlamenton, tiel informas la burĝa ~~gazetaro~~ gazetaro la legantaron.

Hitlero kulpigis la komunistojn, pretekstante la fajron, kaj komencis persekuti la komunistan kaj sindikatan movadojn. Tiu fajro estis unu el la plej gravaj okazaĵoj en la monda historio. Mi sentis kvazaŭ mi estus en Berlino en tiu grava momento. Mi scias, kio okazis poste, sed tion sciis nek Ŝimazaki, nek Heini. Legante la leteron, mi kriis al ambaŭ « Baldaŭ Hitlero arestos vin! Singardu! »

Alia germana amiko estis arestita kaj sendita al la koncentrejo Dachau. Mi eksciis tiun fakton danke al esploro de mia germana amiko. Tiamaniere en la leteroj de la korespondantoj de Ŝimazaki aperis multaj historiaj aferoj, tial

mi deĉifradis ilin kun grandaj intereso kaj emocio. Tiaj leteroj estas tre gravaj ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por historiistoj. Mi pli sentis gravecon aperigi la leterojn libroforme por ke multaj homoj povu legis ilin.

Mirakla Renkontiĝo kun Taekazu

La filo de Ŝimazaki Toŝikazu kaj mi sentas, ke nia renkontiĝo estis "miraklo". Taekazu, kiu ne sciis, kiel trakti la havaĵojn de sia forpasinta patro, renkontis min, kiu estis lerta kaj pri Esperanto kaj pri eldonado, kaj lia forpasinta patro ŝajnas reviviĝi. Mi en la lastaj jaroj de mia vivo povas prezenti al la mondo gravajn materialojn pri la Esperanto-movado temantajn pri mia hejmloko Gunma.

Cetere, se ni du renkontiĝus antaŭ 20 jaroj, la Interreto ankoraŭ ne estus tiel bone disponebla, kaj mi ne havus multajn konatojn en la mondo. Tial mi ne povus verki la libron kun tiom da enhavo. Ankaŭ ni ambaŭ havas 80 jarojn, kaj inter niaj samklasanoj estas multaj, kiuj jam forpasis, do mi povas pensi nur, ke dank’ al Dio kaj Zamenhof ni vivas nun por plenumi tiun gravan taskon.



Ĉiuj deĉifritaj bildkartoj kaj leteroj aperis en la KD-libron (kompaktdisko) en oktobro 2023, en kiu troviĝas fotoj de ĉiuj poŝtkartoj kaj leteroj kun Esperanto-tekstoj, japanlingvaj tradukoj kaj ambaŭlingvaj klarigoj pri rilataj aferoj aperintaj en la poŝtkartoj kaj leteroj.

Mi baldaŭ sendos la ekzemplerojn al la Libro-Servo de UEA, do mendu la libron ĉe ĝi.

La 30-an de oktobro 2023
Verkita de HORI Jasuo (Japanio)

Esperantistoj en la 1930-aj jaroj (KD-versio)

Enhavo: 293 leteroj kaj poŝtkartoj el 40 homoj el la mondo
Kvanto de paĝoj (A4-formate):

1.	Korespondado de Ŝimazaki	32 paĝoj
2.	Italio kaj Germanio	273 paĝoj
3.	Okcidenta Eŭropo	171 paĝoj
4.	Sovetunio kaj Orienta Eŭropo	194 paĝoj
5.	Ameriko	127 paĝoj
6.	Azio	196 paĝoj
Sumo:		993 paĝoj

Prezo: 30 eŭroj.